

Cena numeru 50 gr.

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.

Abono: 1/4 jare 1.50 zł., 1/2 j. 3 zł. jare 6 zł., Eksterlande egalvaloro

Konto en P. K. O. Nr. 11.025

La Redakcio ne resendas manuskriptojn — konservu kopion.

Redaktoro kaj eldonanto:

STANISŁAW KAROLCZYK

PROTEKTOROJ:

Prof. Dr. Odo Bujwid, Jan Kostecki, Dr. Emiljan Loth.

SUBTENANTOJ:

Ing. Roman Iwo Dobrzański, Antoni St. Stankiewicz.

HELPANTOJ:

Dr. Ignacy Dziedzic, Włodzimierz Miernicki.

ENHAVO:

JAN KOSTECKI: Printempa sonorado. — ESKA: Fragmento el la letero. —
MIECZYSLAW KAUS: Alvoko al maljunigantaj esperantistoj. — LEO TURNO:
Pri la esp. gazetara lingvo. — MIECZYSLAW TROCHIMOWSKI: VII Kongres Pol-
skiego Towarzystwa Esperantystów w Wilnie. — Komuniko Nr. 2 de la O. K.
de l' VII Kongreso de P. E. A. — S. A. KOWICZ: Mi veturas al Wilno... —
Opinie. — TH. CART: Pri landnomoj. E. F. C.: Bibliografio. — Pala Esperantista
movado. — Ze ŝiata Esperanckiego. — Pri nia I Kongreso. — De la Redakcio.

JARO XX.

Warszawa, Aprilo 1926

Nr. 4 (122).

Niaj subtenantoj:

Nia gazeto, privata eldonaĵo de la Redaktoro, bezonas la bonvolan materialan helpon de tiuj polaj esperantistoj por kiaj ĝia progreso estas kara kaj kies cirkonstancoj tion permesas. Ju pli da subtenantoj anoneiĝos des pli enhavoriĉa, luksa kaj pli efika estos la „Pola Esperantisto“.

unika esperanta revuo por poloj.

La nomojn de la subtenantoj ni ĉiam presas sur la unua paĝo de la kovrilo.

Fariĝi Protektoro, Subtenanto aŭ Helpanto de „Pola Esperantisto“ povas ĉiu persono, kiu enpagos monate po Zł. 30, 15 aŭ 5.

Subtenantoj ricevos sen plua pago 2 ekzemplerojn de la gazeto.

Eldono de la
„Pola Esperantisto“
Widok 19, Warszawa.

Memoru pri Adreso de la VII Kongreso:

S-ro Roman Sakowicz, Wilno,
Krzywa 23.

Sendu tuj vian Kotizon!



Abonu kaj abonigu por Via gazeto!

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XX.

Warszawa, Aprilo 1926

Nr. 4 (122)

Printempa sonorado.

Martaj burĝonoj lumigas nigrajn branĉojn de la arboj per milo da helaj kandeloj.

Vento kuras tra la mondo. El kamparoj, el grandegaj arbaroj, ĝi penetras en la urbajn stratojn. la stranga odoro plenigas la aeron. Naskiĝas juna mondo. Ĉie tremas aperonta vivo. Hej! Kio do moviĝas tiel en la brusto?

Printempo, printempo sonoras sian sonoradon.

La vivo de la homaro ankaŭ havas siajn printempojn. Estis printempo en marmoraj Atenoj, kiam venis la novaĵo pri Maratona venko. Printempo, kiam, la 4-an de julio de 1776-a jaro, Georgo Washington proklamis la sendependecon de la Unuigitaj Amerikaj Ŝtatoj. Printempo, kiam la popolo de la glora Parizo fordonis al flamoj kaj detruo la sklavigajn murojn de Bastiljo. Printempo malfeliĉa, sufokita en la sango de popoloj: la „Popola Printempo“ de 1848-a.. Alia printempo, kiam rusa caro abdikis sian tronon, kaj estis la granda Rusujo kiel koloso el nigra tombo subite en la tagan lumon transportita.

Kaj kiu do inter vi, polaj amikoj, ne memoras tiun brilantan printempon de la grizaj novembraĵoj de 1918-a jaro, kiam nia amata patrino, la dolĉa Pola Tero rompis jarcentajn katenojn?

Printempo, printempo sonoras sian sonoradon.

Gaja estas la animo, Krii volus la gorgo. Kaj ĉu ne larmoj estas kaŝitaj sub la ridantaj palpebroj? Suferigas ka-resinte la ĉarma momento. Ĉar kun sufera ĝojo leviĝas la homaro:

Hodiaŭ:

Pene riparas la popoloj siajn ruinojn. Super la kadavroj de la granda buĉado kreskas nova herbo. Multajn monumentojn konstruis funebrantaj manoj. Sed mankas la granda, la

vera, la unika: tiu de la interhoma sento, kiu defendus la filojn kontraŭ la abomenaĵo, travivita de la patroj. Ĉiam, ĉiam hurlas la malamo. Ĉiam, ĉiam forgesita estas la plej grava vorto de ĉiuj homaj lingvoj: „homo“. Kaj en diversaj dialektoj, diversaj popoloj insultas unu la alian.

Hodiaŭ:

Sopiras homoj al frateco, al justeco, al egaleco. Ili volus esti rondo familia de liberaj, de bonstataj, de kleraj popoloj, kiuj uzus la riĉaĵojn de la globo, la fruktojn de la laboro, la donacojn mirindajn de la scienco por la plej granda bono de ĉiuj.

Kiu do prenos martelon en la manojn?

En la freŝa mateno, en la gaja sunlumo de printempa tago disbatila murojn inter la popoloj! Al Francoj, al Germanoj, al Japanoj, al negroj paroligi la esperantan lingvon! Al ĉiu homo doni homan rajton, al ĉiu homo doni fratan rajton!

Jen tie ĉirkaŭas nin muroj. Malnovaj muroj bastiljaj. Svenas inter ili la homaro. Ekstere zumas juna blovo. Vento de vastaj kampoj, de arbaroj, de naskiĝanta nova vivo.

Ĝi vokas! Aŭskultu!

Printempo, printempo sonoras sian sonoradon.

Paris, 13. 3, 1926.

Jan Kostecki.

Fragmento el la letero.

Pilgrimante tra l'vivo, ĉu dum hor' espera,
Aŭ dum sorto per sia pezo min fortprenis
Kun mi ĉiam vagadis via kor' sincera,
Kaj en vivo-boato ĉiam kun mi remis.

En fremdujo dum akra sopiro min mordis,
Je patrujo amata, je koroj proksimaj —
Per espero vi mian animon agordis
En leteroj pri hejmo, amikoj intimaj.

Se kun fremdaj nur devas vivon vi dividi
Kiel sentas feliĉa sin homo se havas
Tiel koran amikon, kiun povas fidi,
Kiel vortoj skribitaj el la hejmo ravas...

Kiom foje leteron de vi mi rigardas,
Vi ekstaras tuj antaŭ la miaj okuloj.
Rememoroj en koro pri pasinto ardas,
Pri ideo, al kiu ni servis revuloj...

Eska

ALVORO AL MALJUNIGANTAJ ESPERANTISTOJ.

La lingvo Esperanto ekzistas jam tiom da jaroj, ke ĝiaj iam eĉ junaj adeptoj bone jam maljuniĝis. Multaj... ho ve! forlasis nin por ĉiam kaj ripozas en eterna silento.

Niaj antaŭaj vicoj da pioniroj evidente jam breĉiĝis, sed bedaŭrinde la breĉoj plilarĝiĝis ankaŭ pro manko de multaj iam fervoraj esperantistoj kaj kiuj nun silentas kaj restas ekster nia rondo.

Ni laŝu tiujn. kiuj konscie kaj vole silentas. Tamen restis multe ankoraŭ da tiuj, kiuj silentas ne pro ŝanĝo de opinio pri Esperanto, sed pro tio, ke en ilia animo estingiĝis kelkaj fajreroj, iam vive flamantaj, kaj kiujn nun la vento de tempo forblovis ien.

Pri tiaj samideanoj mi rememoris hodiaŭ... Mi klinis la kapon kaj, meditante pri tio, kio pasis, mi eksentis larmon en la okuloj.

Ŝajnas, ke iu nuboj kovras iliajn okulojn, ke iu fremda bruo ŝtopas iliajn orelojn, ke ilian koron glaciigas iu malvarmo...

Silentiĝintaj Samideanoj! Se miaj vortoj trafos okaze viajn manojn kaj se vi, en libera tempo, turnos viajn okulojn al tiu ĉi paĝo, retrovu por momento en via memoro la pasinton kaj elserĉu en ĝi tiujn helajn horojn, en kiuj via animo ardis al ideala bono. belo kaj vero; kiam vi per Esperanto, kiel lingvo internacia, aspiris al realiĝo de proksimiĝo de homoj, dissemitaj sur nia gran-

da terglobo kaj restintaj ĝis nun fremdaj, surdaj kaj mutaj pro manko de ligilo inter iliaj mensoj.

Rememoru pri la unuaj esperantaj rondetoj, en kiuj viaj vortoj radiis kiel suno sur la kunvenintojn kaj en kiuj vi kreadis fontojn de estonta fluejoj de nova kulturo!

Rememoru pri la unuaj internaciaj kongresoj, dum kiuj fratiĝadis homoj ĝis tiam tute fremdaj por si, kaj kiujn ekligis nun facile ellernita komuna lingvo!..

Kia entuziasmo plenigadis niajn korojn! Oni pensus, ke ĝenerala amo ekregos sur la mondo por ĉiam!

Vi eble disiluziĝis en la nerealeco de viaj aspiroj, kaj via ardo iom falis kaj malvarmiĝis sur la griza nivelo de nia ĉiutaga vivo?

Sed se vi ne ankoraŭ decide lasis por ĉiam esperantistojn kaj se vi nur eksilentis eble ankaŭ pro diversaj aliaj cirkonstancoj, kiuj sin alkroĉis al via nuna vivo, do en via spirito ne estingiĝis ĝisfunde la fajro, kiu antaŭe heligadis kaj vermigadis vian ĉirkaŭon.

Tamen, se vi, maljuniĝantaj Esperantistoj, ne rimarkos ankoraŭ abismon inter via nuntempo kaj la pasinto, vi ekkonscios, ke novaj junaj adeptoj de Esperanto kaj Esperantismo bezonus pontojn. neplene konstruitajn de vi kaj tra kiuj ili pli feliĉe povus marŝi antaŭen al komuna celo, por la venko de nia ideo.

Novaj disĉiploj bezonas malnovajn spertajn majstrojn, kun kiuj ili daŭrigus la komencitan verkon.

Serta majstro ne bezonas labori praktike, li nur gvidu laboron, li donu planojn, instigajn vortojn.

Por tio oni ne postulas multe da tempo. Kaj la konstruaĵo altiĝos rapide, kiun fine kovros la tegmento de venko.

Kiam vi atingos la agon de fizika inerteco, vi ripozos en la palaco, en kiu vi trovos viajn proprajn brikojn kaj kiuj ĝojigos viajn lastajn horojn de la vivo.

Revenu al ni, karaj amikoj, kaj ni denove kune kun nia juna generacio daŭrigos tion, kion inspiris al ni la genia spirito de la kreinto de Esperanto.

Mieczysław Kaus

Pri la esperanta gazetara lingvo.

„Ĉu Esperanto mem estas kulpa?“ „Aŭ kulpaj estas la redaktantoj?“ tiel mi demandis en unu el antaŭaj numeroj de „P. E.“.

Mi kulpigas la redaktantojn. Mi kulpigas ilin, sed mi ne akuzas, ĉar senkulpigeblaj, eĉ laŭdindaj ili estas, ĉar ili estas ĝuste tiuj kiuj la plej multe laboras en Esperanto.

Kion faras la esperantistoj, se ili ne redaktas gazeton?

Unu fojon en la semajno ili venas al sia klubo, du fojojn semajne ricevas kaj ekspedas poŝtajn kartojn, sed cetere? **N e n i o n .**

Estas la redaktantoj de la esperantaj gazetoj, kiuj plej sindone forprenas la plejparton de sia tempo por oferi ĝi al la esperanta afero.

Kaj tamen. Tamen ili ne estas redaktoroj kaj nur profesia redaktoro povas tiom multe oferi de sia tempo, kiom oferas en ĉiu alia lingvo, homo okupanta sin pri la plej intensa spirita nutrado de la popolo, pri — gazetgvidado.

Ni estas eble ne ankoraŭ

venintaj al la epoko, en kiu nia lingvo estos staranta sur tiel forta bazo, kiel aliaj vivantaj lingvoj. Multo mankas en Esperantujo, eĉ pli multe mankas ol estas. Sed ĝuste tial estas la granda devo de la homoj, kiuj havas la influon la plej efikan sur la evoluon de Esperanto, atenti kaj observi tre bone la fakton, ke la sorto de la lingvo internacia estas ne en aliaj ol en iliaj manoj.

Oni ofte ripetas, ke ni havas specialajn lingvajn instituciojn, la Lingvan Komitaton, la Akademion, kiuj zorgas pri ĝusta tenado de la lingva evoluo de Esperanto. Plene erara estas la opinio, ke L. K. havas iun ajn eĉ plej etan influon sur la evoluon de Esperanto. La L. K. povas nur ex post konstati, esprimi sian opinion, konsili, eble protesti, fine *malpermesi* lingvajn aferaĵojn. Komparu, mi petas, la „decidon“ pri la landnomoj. La L. K. malpermesis „io“ kaj rekondukis la erarintojn sur la ĝustan vojon de „ujo“. Ĉu ĝi sukcesis tion fari? Hodiaŭ, kelkajn

arojn post la menciita decido, Prof. Cart skribas en sia lasta cirkulero:

„Ke grava oficiala Societo, malgraŭ ĉiuj miaj plej amikaj konsiloj eĉ petegoj, ĉu publikaj, ĉu privataj, persiste uzas, por kontentigi ĉiujn (?), tri sistemojn pri la landnomoj: Svislando, Belgio, Danmarko — stranga, nelogika „hibridaĵo“ — tion mi tre sincere badaŭras kaj tute ne povas aprobi. Se al UEA tiom malplaĉas „ujo“, ĝi uzu ĉie ...lando!“.

Tiel devas esti skribate la 28. de Februaro 1926, malgraŭ aro da decidoj, tiel de la Akademio, kiel de kelkaj naciaj Kongresoj, fine eĉ de la XVI. kongreso universala, do instanco preskaŭ supera...

Ĉar la lingvo havas siajn manierojn de vivado, siajn specialajn vojojn, kiujn ĝi ŝatas iradi. Unu el tiuj vojoj, la plej grava „landvojo“, la ĉefa „ŝoseo“ estas la presaĵaro, precipe la perioda. Tial la redaktantoj estu tre singardaj kaj kribru tre bone siajn esprimojn antaŭ ol meti ilin antaŭ la publikon

Jam pasis la tempo, en kiu ĉiu nova adepto de Esperanto estis kun emocio kaj entuziasmo rigardata. Jam delonge ni posedas plene organizitan lingvordon en Esperanto kaj tiu, kiu volas uzi ĝin, lernu ĝin

unue tute bone, tiel kiel oni lernas alian lingvon.

Jen mi venis skribi pri la alia problemo: „Ĉu kulpa estas Esperanto?“.

Jes, certe. Certe ĝi estas kun kulpa, ĉar ĝi troe reklamigis — facila. Oni prilaudis ĝin la plej facila lingvo, la plej facile lernebla el ĉiuj. Lernebla? Jes, sed ne ellernebla. Certe, ĉiu iomete instruita homo proprigas al si Esperanton en daŭro de kelkaj semajnoj, dum li bezonas multajn monatojn por scii tiel same iun ajn alian idiomon. Ne estas necese pruvi tion — al esperantistoj. Sed ĝuste la esperantistoj ne volas kompreni, ke lingvo *internacia* devas esti vere inda je tiu nomo. „Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia“. Tiuj vortoj de nia majstro devas esti antaŭ niaj okuloj de ĉiu homo skribanta en nia lingvo D-ro Zamenhof tial ke li volis fari Esperanton ne nur laŭ nome, sed ankaŭ fakte internacia, formis ĝin laŭeble tiel, ke ĝin venis nun tio, kio estas komuna al ĉiuj lingvoj de la mondo. Restas por la esperantistoj aktivaj la sankta devo ne flankenigi la rektan vojon de evoluo de Esperanto, antaŭmontritan de ĝia aŭtoro.

Leo Turno, L.K.

Ne forgesu pri nia VII Kongreso.

Partoprenu la Karavanon al Wilno.

Uwaga!

Uwaga!

Zarząd grupy warszawskiej Polskiego Towarzystwa
Esperantystów organizuje

KARAWANĘ

== na Kongres w Wilnie. ==

Uczestnicy karawany otrzymają 33 % zniżkę na przejazd z
Warszawy do Wilna.

Wszyscy esperantyści z Warszawy i prowincji proszeni są
o liczne wzięcie udziału.

Informacji udziela Referent kongr. p. **Jan Ferencowicz,**
Warszawa, Leszno 72 m. 3.

VII Kongres Polskiego Towarzystwa Esperantystów w WILNIE.

Siódmy Kongres!

W ciężkiej pracy dla idei rozwija się Polskie Towarzystwo Esperantystów. Wolno, lecz uparcie zwalcza przeszkody, piętrzące się na drodze propagandy Esperanta w Polsce, a praca mimo wszelkie trudności pójdzie aż do dnia zupełnego zwycięstwa. Wówczas powiedzieć sobie będziemy mogli: „Wy rwaliśmy, bo dwa wzniosłe hasła przyświecały nam na drodze ku dobru: ojczyzna i ludzkość!”.

*

Z dumą spoglądać możemy na dotychczasowe owoce naszej pracy. Już siódmy Kongres!

Rzućmy okiem wstecz na dzieje naszych ostatnich zjazdów. Czwarty Kongres w Poznaniu dał ideę esperantystom polskim, ideę tak potrzebną w życiu każdej społeczności; piąty dał rzut orientacyjny na całokształt ruchu esperanckiego w Polsce, pozwolił zdać sobie sprawę z kim i w imię jakich haseł współpracujemy; szósty przyniósł silną organizację Polskiego Towarzystwa Esperantystów, najdawniejszego i jedynego ogólnopolskiego ugrupowania.

Jakież zadania ma Siódmy?

Prace dla Esperanta ogniskują się przede wszystkim w towarzystwach narodowych. Bez mozolnej, szarej pracy lokalnej ruch nasz nie posunąłby się ani na krok naprzód. A prace jednej z takich placówek, Polskiego Towarzystwa Esperantystów, przerastają już zakres ram, zakreślonych poprzednio.

Siódmy Kongres rozszerzy program prac, przyniesie silniejsze zacieśnienie węzłów organizacyjnych między poszczególnymi placówkami, przyniesie zrozumienie ogółu esperantystów, że tylko jedno silne duchowo i ideowo towarzystwo gwarantuje pomyślność wszelkich poczynąń.

*

Prace przygotowawcze wrą w całej pełni. Komitet Organizacyjny, składający się ze znanych nam pionierów idei, dokłada wszelkich starań, aby zewnętrzny obraz Kongresu odpowiadał ważnym decyzjom, które przyjmujemy. Zarząd Centralny przygotowuje program prac. Stały Referat Kongresowy w Warszawie czynnie współpracuje z Komitetem Organizacyjnym,

Bądźmy więc spokojni o organizację naszego zjazdu, jak również o to, że wyciśnie on niezatarte piętno na przyszłej pracy towarzystwa.

Esperantysto! Pomyślność Kongresu zależy tylko od Waszego licznego stawienia się do apelu. Wzywa Was dobro ludzkości, wzywa Was dobro kraju umiłowanego, dla którego nie szczędziliście zapалу, trudu i krwi!

Pokażcie, że Esperantysta Polski świadomy jest celów, które sobie nakreślił.

Mieczysław Trochimowski.

Komuniko Nr. 2

de la Organiza Komitato de l'VII-a Kongreso de P. E. A.

(Wilno, 2-24 majo 1926 j.)

Vekiĝanta printempa vivo donas nevajn fortojn al la O. K. kiu opinias, ke la VII-a Kongreso devas esti ne nur intervidiĝo de kongresanoj sed la grava paŝo en prop gando de Esperanto en Wilno, kiu estas nun en stato dormanta. Por atingi tiun celon O. K. invitis ĉiujn grupojn de P. E. A. kaj zolajn energiajn Esperantistojn — propagandi inter Pola Esperantis'aro necesecon de grandnombra ĉeestado en Wilno dum Pentekosto;

Esperantistaj Kongresoj plejparte donas al siaj membroj nur rajtojn kaj plezurojn; nia VII-a postulas de ili ankaŭ devojn — propagandi Esperanton per siaj ĉeestado Wilno mem, kiel urbo, estas agraba somere, oni nomas ĝin „perlero de Polian-da krono“, do neniu bedaŭros, ke li vidis urbon de Mickiewicz, samtempe helpante al nia komuna ideo. Urbo nia estas mezkara, posedas sufiĉe bonajn hotelojn unua- kaj dua-rangajn, kies detalaj prezoj O. K. volonte komunikos laŭ bezono.

Krom tio Towarzystwo Krajowawcze cferis al la O. K.

loĝejon kun sufiĉa kvanto da litoj je prezo de 1 zł. por unu plenkano.

Dum kongreso estas aranĝota komuna tagmanĝo, verŝajne en bela urba ĝardeno, proksime de rivereto kaj poste surŝipa vojaĝeto al proksima somerloko.

Estu do „nia diligenta kolegaro“ kiel eble grandnombra por montri al Wilna loĝantaro (kiu estas dume indiferenta por nia ideo ke Esperanto floras kaj kreskas.

Memoru, ke O. K. devas scii kiom da gastoj ĝi havos, do sendu tuj vian kotizaĵon (5 zł., por subtenantoj — 10 zł. por studentoj — 3 zł., al S-ro Józef Bacewicz, Wilno, Mickiewicza 33) kaj Vi ricevos belan kongreskarton. Al dezirantoj konatiĝi kun Wilnaj vidindaĵoj ni volonte sendos ĉarmajn poŝtkartojn de Bułhak — 15 gr. po peco.

O. K. sin turnas al P. E. A.-anoj kun varmega peto pri vigla kunlaborado.

Ĉiuj informoj, proponoj kaj petoj — ĉe S-ro R. Sakowicz, Wilno, Krzywa 23, VII-a P. E. A. Kongreso.

Wilno, marto 1926.

Roman Sakowicz
Ĝenerala Sekretario.

Mi veturas al Wilno...

(Provo de tre serioza artikolo).

Kiel estas nun ĉie konate, niaj Kongresaj Intervjuoj en Wilno, presitaj en la unua numero de „Pola Esperantisto“ havis grandan sukceson en esperantista mondo kaj eĉ en aliaj mondoj. Vere, la Ligo de Nacioj ne ankoraŭ invitis min, kiel Honoran Konstantan kunlaboranton; ankaŭ mi ne ricevis ĝis nun la sciigon el Lingva Komitato, ke mi estas invitata kiel „senmortulo“, — sed vi scias kara leganto, ke poŝto tiel malbone funkcias nun, post la milito, kaj mi ne miras ke tiuj invitiloj, jam senditaj, perdiĝis survoje.

Tiuj intervjuoj eĉ eĥis en mia privata vivo, ĉar mia amata

edzino, (estu ŝia vivo longedaŭra!) tra leginte kun helpo de vortaro peceton en kiu mi skribis pri „feliĉa romanseto“ — tuj montris al mi sian kontentecon (detaloj ne estas tro interesaj).

Do, mi ne estis tute mirigita, kiam nia Redaktoro, kiu estas tre serioza homo, vokis min kaj diris:

— S-ro Kowicz! Kion vi pensas pri via intervjuo artikolo? Mi modeste klinis la kapon kaj la okulojn kaj dolĉvoĉe komencis:

— Kara kaj alteŝatata Redaktoro! Vi, kiu staras kiel Atlanto ĉe la fontoj de Esperantujo; Vi, kiu kiel suno sendas siajn honorariaj radioj, Vi...

— For kun Atlanto, suno kaj honorario! ektondris la redaktoro — Estas honto, ke vi, grizhara homo, avo de kelkaj simpatiaj

Opinie.

Profesor Richet mówi:

Często mnie pytają, dlaczego jestem Esperantystą. A więc odpowiem szczerze, że dla dwóch powodów bardzo łatwych do zrozumienia.

Po pierwsze: trzeba dwóch lat, żeby się nauczyć jakiegokolwiek języka, a tylko jednego miesiąca, żeby się nauczyć języka Esperanto. Chyba to wystarczy dla ludzi, którzy biorą rzeczy praktycznie.

Drugi powód jest natury głębszej, że tak powiem, uczuciowej.

Wspólny język jest wyrazem powszechnego braterstwa, jest czynnikiem pokoju.

Z chwilą, gdy wszyscy ludzie będą znali i mówili (oprócz

swego języka ojczystego) także i językiem Esperanto, zniknie z horyzontu to widmo, które nam stale grozi — widmo wojny! A widmo to znają wszyscy. Niesie ono ze sobą krzywdy, grabieże, występki, zbrodnie, krew i błoto.

Wszyscy, którzy kochają pokój, pomyślą tak, jak ja, że język wspólny, międzynarodowy jest najlepszym twórcą tej braterskiej, ogólnoludzkiej cywilizacji, którą dotąd widzimy tylko w sennych marzeniach.

Członkowie Instytutu Zoologicznego w Bordeaux zebrani w dniu 21 lutego 1926 r. uchwalili:

Ponieważ dzieła naukowe wydawane są w bardzo wielu

esperantistinoj, tiom facilanime redaktas viajn artikolojn! Kion do Vi skribis en via intervjuo: pri kaŭkazaj anekdotoj, feliĉaj romansetoj kaj eĉ kritikis la personon de l' Delegito de U. E. A. Vi estas granda pekulo kaj kiel puno vi devas denove vojaĝi Wilnon kaj skribi al ni duan, sed seriozan artikolon!

Tremante mi manpremis du redaktorajn fingrojn kaj senhumora revenis hejmen.

Vojaĝi Wilnon! Nun, kiam la printempa vetero salutas novkreskantan vivon, kiam belaj varsovianin.. (pardonu, mi forgesis, ke mi devas esti serioza).

Unuvorte, mi prenis en mia hejmo lastjaran Jarlibron de U. E. A. (interalie, ĉu Vi estas membro de U. E. A., kara leganto? Se jes, Vi povas dormi

kviete, se ne...) rigardis la skribaĵon sub titolo „Wilno“ kaj komencis mian seriozan artikolon.

— Wilno Ĝi kuŝas ĉe rivero (kaj tre bela) Wilja. (Tiu Wilja havas nenion komunan kun alia, el opereto „la gaja vidvino“) 204.000 da loĝantoj. Geloĝantoj de Wilno estas tre simpatiaj. (mi komencas bedaŭri, ke mi ne loĝas tie) bonkoraj kaj vivplenaj. Kiam vi vojaĝas, e zemple, tramvagone en Warszawa, ĉiuj pasaĝeroj sidas, laŭ franca proverbo, „tiritaĵo je kvar pingloj“ kaj nur ia okazintaĵo, kiel ekzemple — malapero de monujo — povas ilin movigi.

En Wilno estas tute alie. Kiam vi vojaĝas aŭt buse (wilnaj tramveturiloj), oni komencas vin distri per ĉiuj novaĵoj

zykach, sądzymy, że wielkimi ułatwieniami byłoby, gdyby były one wydawane również w języku wspólnym dla wszystkich.

A ten język istnieje — jest nim Esperanto, który jest zarówno łatwy do nauczenia się, jak i nadaje się do tłumaczenia wszelkich tekstów naukowych z innych języków. Wartość tego języka okazała się

na Konferencji międzynarodowej w Paryżu w 1925 r.*)

Wyrazamy więc życzenie, aby do wszystkich dzieł i artykułów naukowych dodane było odpowiednie tłumaczenie w języku Esperanto.

*) Mowa tu o Konferencji naukowej, która odbyła się w Paryżu w kwietniu r. u.

Prof. Cart pri Landnomoj La sistemo de D-ro Zamenhof.

En la ĉi suba esploro mi tute *objektive* klarigos la Zamenhofan sistemon. Ĝin mi ne intencas, ne *volas* diskuti, sed mi rajtas konstati, ke ĝi zorge atentis pri la necesa rilato inter la nomo de la lando kaj tiu de la regnanto, ke tre sufiĉe *logika* ĝi estas kaj ke, kiel skribis en sia Raporto (paĝ. 8, konkludo), Prof. Grosjean Maupin „la fideleco al la

de l' urbo, demandas Vin eĉ pri via familio, malsanoj ktp., kaj kiam Vi post eliro malkovros maleston de via monujo, vi ĉ ne estos tro kortuŝita — tiom vi estis kontenta de bele pasigita en babilado tempo.

Sed vi eĉ ne bezonas malagrabliĝi, ĉar estas tiom da lokoj en Wilno, kie via senhumora frunto sereniĝos. Vi povas iri al la kvieto Wilja kaj sur ĝia bordo, fiere nomata „plaĝo“, rigardi belajn figurojn de ĉarmaj wilnanino.

Se vi ĵuros nenion diri al mia edzino (estu ŝia vivo longedaŭra!) mi povas rakonti al vi unu historieton pri tiu plaĝo, mi kaj Henrieto.


Tuj mian kapon trakuras bela kanteto pri

„blankmaneto de l'Henrieto

Estis malgranda, ho mia Di'...
Ŝiaj okuloj, tre fajrobrulaj
Estis plennigr...

Pardonu, mi denove forgesis, ke mi devis verki „tre seriozan“ artikolon. Sed miaj memoroj malhelpas al mi fari tion. Do mi finas. Sed mi vidas, mia kara amiko, ke vi estas tre scivolema — kio estis inter Henrieto kaj mi ĉe la bordo de Wilja. Tion mi volonte aranĝos. Sendu vian helpmembran kotizaĵon por la VII kongreso, venu dum Pentekosto al Wilno kaj sur bordo de Wilja mi rakontos al vi tiun interesan historieton.

S. A. Kowicz.



ĝenerale akceptita tradicio estas el praktika vidpunkto pli sendanĝera ol ia ajn provo“, sed plie, ke ĉia alia sistemo okazigas fatale inter la Esperantistoj kontraŭstaron, proteston kaj diskutojn nepre evitindajn.

Malnova Mondo

Europo, Azio kun Egiptujo (1).

La gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l'sufikso — ujo (2)

Gento:	Adjektivo:	Lando:	Gento:	Adjektivo:	Lando:
Angl-o	—a	—ujo	Ĥin-o	—a	—ujo
Bavar-o	”	”	Ital-o	”	”
Belg-o	”	”	Japan-o	”	”
Brit-o	”	”	Norveg-o	”	”
Bulgar-o	”	”	Pers-o	”	”
Dan-o	”	”	Pol-o	”	”
Egipt-o	”	”	Portugal-o	”	”
Fin(n)-o (3)	”	”	Prus-o	”	”
Franc-o	”	”	Ruman-o	”	”
German-o	”	”	Rus-o	”	”
Grek-o	”	”	Saks-o	”	”
Hind-o	”	”	Skot-o (3)	”	”
Hispan-o	”	”	Sved-o	”	”
Holand-o (4)	”	”	Svis-o	”	”
Hungar-o	”	”	Turk-o	”	”

La sama regulo taŭgas kompreneble por la postmilite restarigitaj sendependaj landoj:

Aŭstr-o *	—a	—ujo	Slav-o	—a	—ujo
Ĉeĥ-o	”	”	Ital-o	”	”
Eston-o	”	”	Slovak-o	”	”
Latv-o	”	”	Ĉeĥoslovak-o	”	”
Litov-o	”	”	k. t. p.		

* Fakte, nova ŝtato de la Aŭstroj.

(1) Por la antikvaj Grekoj kaj Habreoj *Egiptujo* esti⁸ kvazaŭ Azia „Kromlando“. Ĝi, — sed na la cetero de Afriko, apenaŭ konita, — apartenas al la Malnova mondo — same por D-ro Zamenhof, la tradukinto de la Biblio.

(2) Anstataŭ — ujo oni ĉiam rajtas uzi—lando: *Franclando* (mallongige kaj skribe: *Francl.*) apud *Francujo*, kiel *pomarbo* apud *pomujo* preĝdomo apud preĝejo.

(3) Anstataŭ *Fin(n)ujo*, *Skotujo* oni ĝenerale uzas, konforme al la nacia nomo, la formojn: *Fin(n)lando*, *Skotlando* (Vidu Rim. 2)

(4) La vorto *Nederlando* estas nomo, ne de gento sed de lando; sekve la nomo de l'regnano estos: *Nederlandano*.—Same por *Islando* kaj *Irlando*, se *Ira* gento ne ekzistas.

Nova Mondo

Afriko ⁽⁵⁾, Ameriko kaj Oceanio.

Ĉar, politike, malaperis la primitivaj gentoj, la lando mem donas sian nomon al la regnano per aldono de l'sufikso — *ano*.

Lando:	Adjekt.:	Regnano:	Lando:	Adjekt.:	Regnano:
Alĝeri-o	- a	— ano	Marok-o	— a	— ano
Argentin-o	"	"	Meksiki-o(?)	"	"
Aŭstrali-o	"	"	Nov-Zeland-o	"	"
Bolivi-o	"	"	Peru-o	"	"
Brazil(i)-o	"	"	Tunizi-o	"	"
Ĉil(i)-o ⁽⁶⁾	"	"	Urugvaj-o	"	"
Kanad-o	"	"	Uson-o	"	"
Kapland-o	"	"	Venezuel-o	"	"
Kolombi-o	"	"			

Nomoj de Provincoj kaj Urboj.

Aldoni la finaĵon —o al la provinca nomo: *Brandenburgo*, *Silezio*, *Provenco*. — se ne eble, sensaĝe: *Soiret*, *Essex*

Kelkaj nomoj de gravaj ĉefurboj esperantiĝis: *Parizo*, *Genevo*, *Kopenhago*. — Aliaj simple alprenas la finaĵon —o: *Londono*, *Berlino*, — se ne eble, sensaĝe: *Versailles*, *Breslau*.

Plej bona gvidanto restos por ni D-ro Zamenhof.

Th. Cart

Prez. de la Lingva Komitato
kaj de ĝia Akademio.

⁽⁵⁾ Esceptinte *Egiptujon* (vid. Rim. 1)

⁽⁶⁾ Ambaŭ formoj: *Brazil-o* kaj *Brazili-o* estas pli malpli internaciaj kaj uzitaj. Oni do rajtas elekti inter ili. Persone mi preferus — ĉar pli simplaj — la formojn *Brazilo* (adjektivo: *trazila*; sed, de *Brazilio*, la adjektivo estas necese *brazila*) Pri *Ĉil(i)o* oni rajtas same argumenti. — Ĉar tiaj detaloj nenial kontraŭas al la Zamenhofa kaj Fundamenta principo, plej bone decidus la enlandanoj mem en interkonsento kun la Akademio.

⁽⁷⁾ Formo konsilita de D-ro Zamenhof por diferencigi la landon kaj la ĉefurbon.

BIBLIOGRAFIO.

Ferdinand Raimund: La malŝparulo. Originala sorĉfabelo en tri aktoj El lingvo Germana tradukita de F. Zwach. Formato 12×18, 97 paĝ. Tradukita por ludo dum la kongreso ĵen Vieno. La Esperanta teksto estas korekta, kaj facile legebla. La libro interesa.

Vlas Doroŝeviĉ: Orientaj fabeloj. El rusa lingvo tradukis Nikolao Hohlov. Formato 12×18, 66 paĝoj, kun noto de la tradukinto pri lingvaj esprimoj enkondukitaj. Tre ĝustaj, kaj noto biografia pri la aŭtoro, kiu dezirante kritiki la trouzojn en sia lando, transportadis la agadon en Bagdad. La lingvo de la aŭtoro estas vi la, originala. La stilo estas bone konservita de la tradukinto, sen domaĝo por Esperanto.

Tiuj du libroj vekis tian interon, ke ili iel elglitis el la tablo de la redakcio por rondiri ien, kaj estis fine retrovitaj en la biblioteko, kio klarigas la

prokraston de tiu recenzo. Ni esperas, ke tiuj k uj ne legis ilin antaŭe volos ilin legi nun, Oni turnu sin al la firmo Ferdinand Hirt & Sohn. Leipzig. Prezo ne montrita.

Honore de Balzac. La firmo de la kato, kiu pilkludas. El la franca lingvo, tradukis Paul Benoit. Form. 13×19, 75 paĝ. La traduko estas zorge kaj lerte farita kaj la Balzac'emaj Esperantistoj, kiuj legis nur naciajn tradukojn ĝojos certe pro la apero de tiu karakterhava verko. En la tradukado troviĝas, bedaŭrinde, kelkaj vortoj el la speco „senmalvirtulino“ kiu cerbumigos“ iom la leganton, eble anstataŭontan tiun ĉi per „naivulino“ aŭ eble eĉ per „purkorulino“! Estas ĉiam konsilinde uzi kiom eble malplej da afiksoj en la sama vorto, se oni volas esti tuj komprenata. Firmo suprenomita. Prezo ne montrita.

E. F. C.

Pola Esperantista movado.

Warszawa.

— La 21-III en salonoj de gesinjoroj Essigman okazis societa vespero okaze de finiĝo de la unua serio de esperantaj kursoj gvidataj de Pola Esperanto Asocio.

— Post vigla propagando P. E. A. malfermis novan kurson por komencantoj. Samtempe S-ino Cense kaj S-ro Kaus gvidas superan kurson.

— Pola Studenta Esp. Soci-

eto aranĝis 20-III en salono de S-ro Miernicki societan vesperon interplektitan per kantoj kaj deklamoj.

Lwów.

La 21-an de februaro Lvova societo „Esperanto“ festis jubileon de 25 jara egzistado. Dank' al klopodoj de estraro de la societo, la festeno, bonege organizita kaj utiligita ankaŭ por propagandaj celoj, movigis vas-

rajn rondojn de la publiko, interesigis eĉ registarajn kaj militistajn elementojn Solenon ĉeestis vojevodo Garapich, generalo Thuille, rektoro Pawłowski, konata, profesoro de jura fakultato Allerhand kaj multaj aliaj reprezentantoj de la Lvova socio

Inaŭguran paroladon havis la prezidanto de la societo d-ro Wierzchowski. Profesoro d-ro O. Bujwid salutis ĉeestintojn en la nomo de Pola Esperanto Asocio en Warszawa kaj de la Krakowa societo „Esperanto”. Plue parolis d-ro Szczepan Miłkołajski, konata al tutmonda samideanaro kiel fondinto kaj redaktoro de la unua esperantkuracista gazeto, kaj inĝeniero Schnitzer, sekretario de la societo.

Bele sukcesis la koncerta parto, kiu komenciĝis per deklamo de 8-jara esperantistino el New-York. Poste sekvis produktaĵoj de plej eminentaj artistoj kaj artistinoj de Lvovaj teatroj. Koncerton partoprenis ankaŭ konata ĥoro „Lutnia”.

La jubilea festeno finiĝis per bankedo, dum kiu oni tralegis multajn salutajn telegramojn.

Królewska Huta.

25-II okazis propaganda prelego. 5-III komencis kurso por

laboristoj, gvidata de s-ro Kołodziej. Partoprenas 28 personoj.

Nowogródek.

En loka ŝtata gimnazio inĝ. Chmieliński sukcesis esperantigi 20 lernantojn

Sosnowlec.

„Towarzystwo Uniwersytetu Robotniczego” (TUR) decidis aranĝi trimonatan tutlandan kaj pollingvan korespondkurson.

8-IV, en ejo de Ligo de Metalistoj preleganto de TUR prelegis pri progreso de Esperanto kaj ĝia lernado. Ĉeestis 90 personoj. Estas ankaŭ organizita kurso. Loka ĵurnalo „Gazeta Robotnicza” enhavis artikolon de TUR-ano laŭ temo: Memeduko per Esperanto.

Granda sukceso de pola scienco.

Kiel prezidanto de Esperantista Sciencasocio oni elektis profesoron d-ron Odo Bujwid, multjaran prezidanton de Pola Esperanto Asocio.

La Redakcio de nia gazeto prezentas al estiminda scienculo plej varmajn bondezirojn de sukcesplena laboro sur esperanta kampo por gloro de nia Patrujo.

Korekto.

En la marta numero sur p. 45, linio 12 de supre devas esti „daŭeraj” anstataŭ „główniej” (la pola teksto).

Partoprenu nian VII en Wilno.

Ze świata esperanckiego.

Duchowieństwo katolickie, a Esperanto.

W 1925 r. odbył się w Paryżu zjazd katolików-esperantystów pod patronatem dwóch kardynałów i dwunastu biskupów. Papież Pius XI udzielił zjazdowi swego błogosławieństwa. Ksiądz Carolfi z Florencji zakończył swoje kazanie, z okazji XVII Międzynarodowego Kongresu Esperantystów w Genewie słowami: „My, katolicy, musimy posiadać język międzynarodowy, ażeby nasza nauka była rozumiana przez wszystkie ludy tego świata. Religja katolicka i Esperanto to jakby nierozłączni bracia i przyjaciele.

Esperanto w Bułgarii.

Na mocy rozporządzenia Ministerstwa Oświaty z dn. 18 grudnia 1925 r. Esperanto zostało wprowadzone do Instytutu dla Ocimniałych w Sofji, jako język pomocniczy. Otwarto również kursy Esperanta w Lukowit dla uczniów instytutu pedagogicznego i technicznego.

Kursy stenografji w języku Esperanto.

W Pradze Czeskiej rozpoczęto kursy stenografji po esperancku.

Z Bratysławy.

Na mocy uchwały Rady Miejskiej z dn. 4 grudnia r. z. Esperanto zostało wprowadzone jako język obowiązkowy do miejskiej szkoły dla dziewcząt.

Esperanto w Parlamencie Węgierskim.

Podczas dyskusji nad budżetem w parlamencie węgierskim posłanka Kethly poruszała dwukrotnie sprawę Esperanta, polecając ją gorąco Ministrowi Oświaty.

Z Dalekiego Wschodu.

Izba Handlowa z Kioto rozpoczęła w grudniu r. z. kursy Esperanta dla początkujących. Zapisano się 130 osób.

Z Rosji.

Sowiety wydały karty i znaczki pocztowe z napisami esperanckimi.

Pri nia I Konkurso.

Ĉar kelkaj niaj legantoj deziras, ke ni presigu liston de la partoprenintoj, ni tion plezure faras. Krome ni aperigas I-premiitan tradukaĵon.

Tradukaĵon alsendis jenaj gesinjoroj: Anna Kwiatkowska, Stanisław Horn, pas ro Jakób Makara, s-ro W. Niechcicki,

Dr. Bronisław Skalkowski, Homarero, s-ro Emil Kołodziej, skeptikulo, Władysław Niżnik, Tadeusz Gajewski, Kazimierz Grabowicz, Konstanty Miszek, Aleksander Hobor. Mieczysław Ryngiel, Emil Szymański, Tadeusz Dukler, Jan Kaczorowski, Kazimiera Radzińska, Halina

Weingartenówna, Antoni Stanow, Olga Ferensówna. Post la termino alvenis ankoraŭ respondo de s-ro Max Fluhr.

Jen la plej bona tradukaĵo:

De longe mi rimarkis, ke pro la moroj, estas bone iafoje agi laŭ opinioj, kiujn ni scias esti tre necertaj, kvazaŭ ili estus sendube veraj; sed ĉar tiam mi deziris dediĉi min al la nura serĉado de la vero, mi opiniis, ke mi devas agi alimaniere, kaj forlasi kiel efektive falsa, ĉion, en kio mi trovas eĉ la malplej gravan dubon, por konvinkiĝi, ĉu ne restos poste en mia kredo, io absolute fidinda. Tial, pro tio ke niaj sentoj erarigas nin iafoje, principe mi akceptis, ke neniu objekto estas tia, kian ili ĝin prezentas. Ĉar ekzistas homoj, kiuj eraras en rezonado eĉ pri la plej simplaj geometriaj temoj, kaj eltiras erarajn konkludojn, mi konsideris, ke mi ankaŭ estas erarema kiel la aliaj, kaj mi

forĵetis kiel falsajn, ĉiujn temojn kiujn mi estis iam akceptinta kiel pruvitajn. Fine, konsiderante, ke ĉiuj pensojn, kiujn ni havas en stato de nedormo povas ankaŭ veni al ni kiam ni dormas, tamen neniu el ili estas efektiva, ni decidis akcepti, ke ĉiuj temoj kiuj estis enirintaj en mian menon ne estis pli veraj, ol la dumsonĝaj iluzioj. Sed samtempe mi konsideris, ke ĉu mi penas supozi, ke ĉio estas falsa, necesas, ke mi, kiu tion pensas, mi estu io, kaj konsiderante, ke la vero: *mi pensas, do mi estas* estas tiel certa kaj firma, ke eĉ ĉiuj plej ekstremaj supozoj de skeptikuloj ne kapablas ĝin detrui, mi konkludis, ke mi povas senskrupule ĝin akcepti, kiel la unuan principon filozofan, kiun mi serĉas.

Descartes.

De la Redakcio.

Pro kelksemajna foresto de la Redaktoro ĉi tiu numero aperas kun kelktaga malfruigo. La sekvanta aperos regule 15-an de majo.

*

La 18-an de aprilo, kiam la numero estis jam plene kompostita, okazis malkovro de la Zamenhofs monumento.

Detaloj de tiu ĉi seleno aperos en la maja numero.

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk.

Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski.

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Fawla 10.

RICEVITAJ GAZETOJ:

Academia pro Interlingua, (№1).

Akle, organo de Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, Wien,

Amerika Esperantisto, organo de la Esperanta Asocio de Norda Ameriko, (№ 5—2 ekz.)

Belga Esperantisto, organo de la Belga Ligo Esperantista (№ 3).

Bulgara Esperantisto, organo de la Bulgara Esperantista Societo № 6, 7).

Der Arbeiter-Esperant., organo de la Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj, (№ 3).

Esperantista Junularo, organo de Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara (№ 33).

Espero Katolika, organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, (№ 17).

Esperanto, rumania (№ 1).

Germana Esperantisto, organo de Germana Esperanto-Asocio, (№ 3, 4).

Heroldo de Esperanto, neŭtrala organo de la Esperanto-Movado, (№ 17, 18, 19, 20, 23, 24).

Hungarlanda Inlormilo, bulteno de la Hungarlanda Esperanto-Societo.

Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio, Esperanto-Asocio de Estonio, (№ 2, 3).

Internacia Lingvo Esperanta, organo de Universalaj Ligo Esperantida, Ĉehosl. (Nr. 5).

Internacia Medicina Revuo, organo de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (Nr. 2).

Internacia Radio-Revuo, organo de la Internacia Radio-Asocio, (Nr. 1, 2).

Itala Esperanta Revuo.

Kataluna Esperantisto, organo de la Kataluna Esperantista Federacio kaj de la Internaciaj Floraj Ludoj, (Nr. 19, 20).

Konkordo, organo de Sudslavaj esperantistoj, (Nr. 1, 2).

La Kolportisto, organo de la Esperanta Kolportista Asocio, (Nr. 2).

La Espero, organo de Sveda Esperanto Asocio, (Nr. 1, 2).

La Movado, organo de Societo Franca por la propagando de Esperanto, (Nr. 82, 83, 84).

La Ora Speko, (Nr. 2).

La Orienta Lumo, organo de Korea Esperanto-Instituto, (Nr. 4, 5).

La Progreso, organo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

La Revuo Orienta, organo de Japana Esperanto - Instituto, (Nr. 3).

La Ridanta Esperantisto, bonhumora monata gazeto esperanta, (Nr. 6).

La Suda Kruco, organo de la Australazia Esperanto - Asocio, (Nr. 68).

La Suno Hispana, organo de la hispanaj esperantistoj (Nr. 105).

Le Monde Espèrantiste 3 rue Sophie-Germanin-Paris.

Libero, monata revuo internacia de movadoj por reformigo de la vivo, (Nr. 1, 2).

Literatura Mondo, organo de Hungara Esperanto Instituto, (Nr. 12).

Marlo, organo de germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo, (№ 3).

Oomoto, monata organo de | Asocio Portugala de Esperanto,
Universala Homama Asocio, (№ 1, 2).
(Nr 3 — 2 ekz.).

Portugal-Esperanto, organo de | la lingvo Medial (№ 1, 2).
Revista del Ateno, (№ 19),
Unione, gazeto por amikoj de

Nowe uzupełnione wydanie

Kompletnego podręcznika języka Esperanto

Leo Turno, członka Komitetu językowego,
ukazało się już nakładem autora i jest do nabycia w cenie
Zł. 1.25 za egz. Wysyła się najmniej 5 egz. Przy zamów-
wieniu 10 — 25 egz. udziela się 25% rabatu, 25 — 30 egz.
30% rabatu. 50 — 100 egz. 38 $\frac{1}{3}$ % rabatu. Wysyłkę
uskutecznia się po utrzymaniu należności na P. K. O.
Kraków, nr. 405.716 lub na adres:

LEOPOLD DREHER, Kraków, Starowiślna 37.

Kiu varbos 5 novajn abonantojn

ricevados nian organon

senpage dum la tuta jaro.

Kunvenoĵ de Pola Esperanto-Asocio

Warszawa, Królewska 19.

Ĉiamerkrede je 8 ĝis 10 h. vespere. La kancelario
kaj biblioteko funkcias ĉiamerkrede kaj sabate de
7.30 ĝis 9 h. vespere.